

Kelkajn tagojn post la apero de La Sago, la unuaj aliĝiloj alvenis. Dankon al la unuaj aliĝintoj, kiuj tiel multe helpas kaj kuraĝigas la OKK-n. Nun nia tasko konsistas en plibonigado de la programon kaj de la tehnikajn aferojn. Preskaŭ finita programo kaj unua listo da kongresanoj devus aperi en La Sago februara.

En Paŭo, estos «La Grandioza Kongreso» !



Venos al la SAT-Amikara Kongreso 2009 simpatia kaj bela junulino neniam antaŭe ĉeestinta kongreson. Jen varb-argumento por venigi multajn homojn, inajn aŭ malinajn, nur por spekti al kio similas tiel stranga besto !

Ŝi eniros la kongresejon kaj ekrigardos ĉirkaŭe, provante kompreni kiel orientiĝi. Kaj ŝi ekkonos diversajn figurojn de nia esperantista mondo : de ne tro afabla akceptej-dejoranto ĝis frenezeta esperanto-propagandmaniulo. Kaj ni ridetos, kaj ridos pri ili, pri ni mem. Samja Harir (la freŝbakita kongresano) ja konatigos al ni per sia aktorado la priridindajn same kiel la priplorindajn esperantistajn kongres-kutimojn kaj figurojn. Ĉi lastaj estos enkarnigitaj de Christine Vidotto, same vigle kaj entuziasme.

La humuro estas samtempe trafa kaj plena je tenereco... la verkinto de «La Grandioza Kongreso» Rikardo Cash estas mem esperantisto, tamen ! La sinsekvaj scenoj disvolviĝas antaŭ niaj okuloj kvazaŭ ni estus sidintaj tutan postagmezon en kongreseja halo kaj tie spektintaj la tutan okazajaron. Sed feliĉe ĉi tion ni ne bezonas fari : la amatora duopo regas nin per komedio je konvena koncentriteco : nek tro peza, nek tro leĝera, precize horduona kaj ĝustetakta. La aktorado estas entuziasmoplena kaj konscienca, la rezulto estas ege agrabla kaj spektinda. Rekomendata. C. Vidotto kaj S. Harir decidis pluivigi esperantan teatrotrupon en Tuluzo kaj tion malhontinde sukcesis per tiu komedieto surscenigita de Arno Lagrange. Ja SAT-Amikara Kongreso 2009 estos «La Grandioza Kongreso» !

Robin BETO

La dimanĉa koncertejo : La Teatro Sankta-Ludoviko



La mistero de la urbodoma statuo ...

Plejkutime, urbodomojn ornamas alegoriaj respublikaj figuroj. Kial do, sur la frontono de la paŭa urbodomo troviĝas statuo de Talio¹, kun stelita frunto? Fakte, la municipo establiĝis en la nunan urbodomon nur en 1878. Tiu konstruaĵo, situanta norde de la Reĝa placo, estas reale malnova teatro datumanta de 1862. Starigita sur la ruinaĵo de projektita preĝejo, la

Teatro Sankta-Ludoviko² estis aĉetata de la municipo, en 1876, por iĝi urbodomo. Post diversaj malfacilaĵoj, la teatro fermiĝis en 1968 pro nesekureco. Remalfermita en 1984, tiu prestiĝa kadro gastigas ekde tiam prelegojn, teatraĵojn, dancospektaklojn kaj koncertojn. La abundo da skulptaĵoj substrekas la alporton de la stilo de Napoleono la 3a. En tiu Itala teatro okazos la dimanĉon la koncerto de Kaj Tiel Plu.

¹ Talio (Θάλεια), laŭ helena mitologio, estas muzo de komedio kaj de kamparana poezio, filino de Zeŭso kaj Mnemozina. Ŝia nomo signifas ion kiel «floranto». Komence ŝi estis kampara diino, eble diino de floroj, tial komedio origine estis ligita al kamparo. Ĉar ŝi estis gaja diino, ŝi fariĝis muzo de komedio. Oni diras ke ŝi eble estas la patrino de koribantoj, kun Apolono kiel patro. (El Vikipedio)

KONGRESMARKOJ

Ĉijare du glumarkoj estas eldonitaj.

Eblas mendi ilin aŭ al la libroservo aŭ al la OKK kontraŭ 1,5€ por 10 ekzempleroj.

64^a kongreso de SAT-Amikaro
 > Liceo Louis Barthou - 11a-14a de Aprilo 2009

ESPERANTO
 la langue internationale

PAU

★ PAU ★
 E S P E R A N T O
 64^a kongreso de
 SAT-Amikaro
 Liceo Louis Barthou
 11^a-14^a de Aprilo
 2009

Libro pri Jules Verne kaj esperanto



Ni jam anoncis en la novembra Sago la prelegon de Lionel Dupuy «Jules Verne esperantiste». Nun ni ankaŭ povas ĝoje anonci la eldonon de samtitola libro dum la kongreso.

Tiu libreto, kiu povas interesi esperantistojn kaj ne-esperantistojn, estos dulingva-eldono (ĉu vi legis la decembran debaton?).

Retejo de la kongreso

Ne hezitu ofte konsulti la retejon de la kongreso kie ni aldonos la plejn freŝajn gravajn informojn pri la kongreso.

<http://kongreso2009.sat-amikaro.org>

Por skribi al la Okk :
satamikaro2009@gmail.com

Paŭa poŝkarto

Okaze de la kongreso la Okk eldonis poŝkarton pri la urbo Paŭ, kiu pli malpli similas al la kovrilpaĝo de La Sago novembra. Tiel la kongresanoj povos sendi paŭajn salutojn al siaj amikoj.

